

Heinrich Heine,
Venas la jaroj kaj for-
iras

tradukita de Corrado Grazzini

Venas la jaroj kaj foriras
kaj tutaj generacio pasas kun ili;
sed la amo, la amo el mia kor'
ne malaperas.

Unufoje mi volus vidi vin anko-
raŭ,
mi volus fali surgenu eĉe vi,
kaj volus diri mi, mortanta, al
vi:
vin amas mi, virino!

*Traduko de la Germana poemo
“Die Jahre kommen und gehen”
de HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17) en Esperanton
de Corrado Grazzini.*

*Arg-510-1002 (2010-02-07
01:28:19)*

*Tiu ĉi traduko estas laŭvorta Espe-
rantigo, ne rimita kaj ne havanta
la versritmon de la germana-lingva
originalo (Manfred Retzlaff). Ĝi
aperis en la n-ro 1/1967, de la 16-
a de Januaro 1967, en la Esperan-
ta revuo “Heroldo” (laŭ indiko de s-
ro Lars Kromann, Stenbrydervej 6,
Værløse, DK-4640 Fakse, Danujo,
lars.kromann@mail.dk).*

Heinrich Heine,
Die Jahre kommen und
gehen

Die Jahre kommen und gehen,
Geschlechter steigen ins Grab,
Doch nimmer vergeht die Liebe,
Die ich im Herzen hab.

Nur einmal noch möcht ich dich se-
hen,
Und sinken vor dir aufs Knie,
Und sterbend zu dir sprechen:
“Madame, ich liebe Sie!”

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 –
†1856-02-17).*

Arg-510-1001 (2010-02-07 01:26:20)

*Aus dem Werk “Lyrisches Intermezzo,
Gedichte I, Nr. 25”. Siehe auch die
Internetzseite [http://www.textlog.
de/23223.html](http://www.textlog.de/23223.html).*

Heinrich Heine,
Alvenas genera-
cioj

*tradukita de Manfredo
Ratislavo*

Alvenas generacioj
Kaj ree iras for;
Sed ne formortas la amo
estanta en mia kor'.

Nur unufoje, mortonte,
Mi emus revidi cin
Kaj diri al ci surgenu:
“Mi amas vin, sinjorin’!”
2

*Traduko de la Germana
poemo “Die Jahre kom-
men und gehen” de HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17) en Espe-
ranton de MANFREDO RA-
TISLAVO (Manfred Retzlaff,
Stettiner Str. 16, D-59302
Oelde, Germanio, *1938-
11-04).*

*Arg-510-1003 (2010-02-11
11:57:47)*

*Mi, Manfred Retzlaff, uzis
en mia Esperantigo la pro-
nomojn “ci” ka “vin” por
redoni tion, ke la poeto uzis
en la lasta linio la ger-
manan prepozicion “Sie”, per
kiu oni alparolas fremdajn
personojn. Sonas tio iom
ironie aŭ moke. La poeto
faris tion verŝajne intence
por distancigi sin iom, kva-
zaŭ ŝerce.*

²aŭ eble:

“Madame, mi amas vin!”;

ĉar ankaŭ en la germana-lingva originalo troviĝas la franca vorto “Madame”.